Simon Dach,

# Anjo de Tharaŭ

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

Anjo de Taraŭ plaĉegas al mi,
Monon kaj vivon mi donus por ŝi;
Anjo de Taraŭ en ĝoj' kaj dolor',
Min rekompencas per propra la kor',
Anjo de Taraŭ, vi mia anim',
Ĝojo de l'vivo kaj ĉarmo sen lim'!

Eĉ se minacus la mondo-ruin',
Tamen neniel forlasus ni nin:
Ĉar en danĝero, turmento, ĉagren'
Amon firmigas ĉiela la ben'.
Anjo de Taraŭ, vi mia anim',
Ĝojo de l'vivo kaj ĉarmo sen lim'!

Kiel altiĝas palm-arba tegment'
Post batala do je pluvo kaj vent',
Tiel kreskadas de l'amo la fort'
Per suferado kaj mokoj de l'sort'.
Anjo de Taraŭ, vi mia anim',
Ĝojo de l'vivo kaj ĉarmo sen lim'!

Se vi disiĝus nevole de mi,
Kien ne vagas eĉ sunoradi',
Mi vin sekvadus trans montoj kaj mar',
Spite mizero kaj malamikar'.
Anjo de Taraŭ, vi rava sunbril',
Paco de l'vivo, de l'koro azil'!

........................................
........................................
........................................
........................................
........................................
........................................

........................................
........................................
........................................
........................................
........................................
........................................

. . .

Simon Dach,

# Anjo de Tharaŭ

*tradukita de N. N. 93*

Anjo de Tharaŭ plej plaĉas al mi;
pli ol trezoro valoras ja ŝi.
Ankaŭ la koron en amsimpati'
Anjo de Tharaŭ donacis al mi.
Anjo de Tharaŭ pli kara ol or',
vi, mia vivo kaj sango kaj kor'!

Eĉ se malsano renkontas nin du
kaj militiro, disigo, malĝu',
tamen pli forte kunligus destin'
ĝis lasta spiro de l'viv' ambaŭ nin!
Anjo de Tharaŭ pli kara ol or',
vi, mia vivo kaj sango kaj kor'!

Kiel palmarbo post pluva veter'
multe ple rekte ekstaras el ter',
tiel la am' pligrandiĝos en kor'
post la mizero kaj brula dolor'.
Anjo de Tharaŭ pli kara ol or',
vi, mia vivo kaj sango kaj kor'!

Kaj se forprenos vin iam la sort'
kaj al senluma kondukus vin bord',
tiam mi sekvus tra fajro kaj mar',
tra malamika eĉ militistar'.
Anjo de Tharaŭ pli kara ol or',
vi, mia vivo kaj sango kaj kor'!

........................................
........................................
........................................
........................................
........................................
........................................

........................................
........................................
........................................
........................................
........................................
........................................

. . .

........................................
........................................
........................................
........................................
........................................
........................................

........................................
........................................
........................................
........................................
........................................
........................................

*Traduko de la Germana poemo "Ännchen von Tharau" de Simon Dach en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919).*

*Arg-1034-2098 (2014-05-31 12:29:43)*

*Tiu ĉi esperantigo troviĝas en* `http://kantaro.ikso.net/anjo_de_taraux`.

........................................
........................................
........................................
........................................
........................................
........................................

........................................
........................................
........................................
........................................
........................................
........................................

*Traduko de la Germana poemo "Ännchen von Tharau" de Simon Dach en Esperanton de N. N. 93.*

*Arg-1034-2099 (2014-05-31 12:53:15)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt u. Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann.*